

ESPERANTISTO

ESPERANTYSTA POLSKI

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE
MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ

ELDONANTO POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO
WYDAWCZA

REDAKTANTOJ PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI
REDAKTORZY

APERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI
GIS LA 20-a DE CIU MONATO.

Esperanto kaj „Polskie Radio”.

La rezulto de la ĝisnunaj Esperanto-prelegoj en la pola staciario estas tute sincera konfeso de la direkcio, ke la prelegoj ĝuas la plej grandan rekonon flanke de la alilanda aŭskultantaro, tian, kian alilingvaj prelegoj de la staciario absolute ne sukcesis akiri. Malkaŝe kaj sincere tion konstatas la ampleksa kaj bele eldonita „Jarlibro de „Polskie Radio”, kie la Esperanto-prelegoj estas tre favore priparolitaj de la direkcio mem, do la konfeso posedas tiom pli grandan valoron, ke ĝi okazis sen nia intigo.

En la jarlibro ni legas: „Esperantistoj estas idealistoj, kiuj volonte aŭskultas per siaj riceviloj dislokitaj en la tuta terglobo ĉiun radiovorton eldiritan en ilia belsona lingvo. En leteroj... ili donas pruvon, ke ili aŭskultis kaj komprenis enhavon de l' prelegoj, pruvon, atestantan pri tio, ke la Esp.-vortoj disvastiĝataj de Polskie Radio ne trafas en vakuaĵon... Speciale oni devas substreki la zorgon de Esp-istoj por utiligi radion por la propaĝando. Ili ne nur volonte aŭskultis la prelegojn, sed mem petis disaŭdiigi prelegon pri ĉiu difinita temo, kiu ne ŝajnis al ili sufiĉe klara”. Ktp. Ktp...

Tiun grandan sukceson ni ŝuldas al la tre multa, speciale alilanda, aŭskultantaro, kiu bonvolis per ofta dank-skribado al la direkcio emigi ĝin por enmeto de Esp.-prelegoj en la programon. Kiel grava estas tiu skribado, konvinku la fak-

to, ke oni kreis en la stacioj t. n. „oficejojn de esploroj”, kies tasko estas kontroli kaj registri la alvenantajn korespondaĵojn, por ekscii, kio estas la deziro de la aŭskultantoj, por ilin laŭeble kontentigi. Tial la Esperanta aŭskultantaro devas forte kontraŭ-bataladi la malvastanimecon de multaj polaj aŭskultantoj, kiuj ne deziras havi en la programoj Esperanton. „Konsole” ni diras, ke ankaŭ ne la angla-franca-kaj alilingvaj prelegojn, kiujn ili volonte ŝanĝus je lecionoj de... iaj konvulsiaj dancoj aŭ ĝazbanda muziko. Do ne flanke de la direkcio minacas la danĝero, sed flanke, de la abonantaro, kiu povas postuli, se... ĝi pagas.

En duono de februaro ni esperas ricevi la programon de la Esp.-prelegoj por pluaj monatoj kaj... ni timas, ke ĝi enhavos tre bedaŭrindan limigon de la ĝisnuna nombro da prelegoj, kiu ŝanceliĝis en monato, inter 3—4. Ankorau estas tempo, oni povus desilteleron de la venko klini al nia flanko, oni nur devas **TUJ MULTENOMBRE SKRIBI** al: Polskie Radio, Warszawa, dankante por la prelegoj kaj petante pri novaj, kiel eble plej oftaj Esp.-disaŭdiigoj. Sed ĉu politike: ne menciu, ke ni vin instiois, ankaŭ ne, ke vi scias pri la minacanta danĝero. Poloj (Pollandanoj) skribu nenre nole, alilandanoj esperante ev. france kaj germane. Fenestre ni atendas vian helpon. Pollanda Esperanto-Delegitaro.

NOVAJ PERSPEKTIVOJ. INTERNACIA TURISTA ASOCIO.

Dum la lastaj jaroj Esperanto estis pli kaj pli ekuzata en la internacia turismo, kiu grave suferas pro la lingva Babelo kaj urĝe bezonas internacian lingvon. Plej vaste kaj efike nia lingvo servis ĝis nun al la turista reklamo. Jam multaj landoj kaj urboj eldonis en ĝi prospektojn kaj broŝurojn (ofte sub la aŭspicioj de UEA), kiuj disvastiĝis tra la tuta mondo kaj en unika maniero kunhelpis al konatiĝo kaj populariĝo de la vizitindaĵoj. Tio ĉi koncernas ankaŭ la grandskalan Esperanto-uzadon de la foiroj de Budapeŝto, Lyon, Reichenberg, Leipzig k. a.

Samtempe diversaj organizoj ekaranĝis eksterlandajn grupvojaĝojn per helpo de Esperanto. Mi pensas tie ĉi ne pri la ordinara kongresaj karavanoj por esp-istoj, sed pri la publikaj ekskursoj, kiajn kun bona sukceso aranĝis Brita Esp.-Asocio (kiu nuntempe havas la rajtojn de vera vojaĝoficejo) k. a. Fondiĝis eĉ Esp.-sekcioj ĉe kelkaj landaj organizoj (Esperanta Turista Komisiono en Svedlando kaj Estonio), kiuj aranĝis jam dekojn da sukcesaj eksterlandaj grupvojaĝoj kun miloj da partoprenantoj.

Tamen ĉio ĉi havis ĝis nun lokan karakteron kaj okazis sensisteme kaj sen sufiĉa internacia kontakto. Por sistemigi la tuton kaj eluzi ĉiujn eblecojn, kiujn liveras Esperanto kiel internacia lingvo, ĵus estas fondita INTERNACIA TURISTA ASOCIO (ITA), kies provizora sekretario estas la subskribinto. La celo de ITA estas: aranĝi malmultekostajn

publikajn ekskursojn en internacia skalo; fari turistan reklamon por ĉiuj landoj; eldoni turistan jarlibron (kiu ĉiujare detale pritraktos en vortoj kaj bildoj iun landon aŭ urbon), kalendaron kaj internacian turistan gazeton; klopodi pri enkonduko de Esp. en la internaciaj turismo kaj trafiko. La oficiala lingvo de ITA estas Esperanto kaj ĝi volas labori en intima kontakto kun UEA, landaj Esp.-asocioj, turistkluboj, ktp.

La laborkampo estas vasta kaj malmulte kultivita, la eblecoj estas grandaj. Estas necesa nur lerta, sistema kaj konstanta laboro, kaj baldaŭ montriĝos la fruktoj. Ĉu ankaŭ vi volas partopreni en tiu laboro, aliĝante al ITA kaj kunlaborante kun ĝi? La kotizo por 1935 estas 5:10 zl, por aktivaj membroj kaj 10:20 zl, por subtenantaj membroj kaj organizoj. La membroj rajtas uzi ĉiajn servojn de ITA, ĝiaj sekcioj, reprezentantoj kaj delegitoj, ĝui rabatojn ĉe grupvojaĝoj kaj ricevi senpage la turistajn jarlibron, kalendaron kaj gazeton. La gazeto sub la nomo „Internacia Turisto“ ekaperos eventuale en majo, la jarlibro 1935 aperos en la fino de la jaro, pritraktante eventuale iun el la nordaj landoj.

La aliĝojn, kotizojn, proponojn kaj sugestojn sendu al Internacia Turista Asocio, Fach 698, Stockholm I, Svedlando. (Ĉiuj Esperantaj gazetoj estas petataj represil).

Henr. Seppik.

POLA-BULGARA AMIKECO.

En la lastaj kelkaj jaroj Bulgarujo estis vizitita de multaj poloj, kiuj tie ĉi pasigis po kelkaj semajnoj dum la somero kaj precipe en Varna. Tiuj vizitoj, kelkaj el kiuj okazis pogrupo, kreis en Polujo propagandon profige al Bulgarujo kiel lando, kiu, en turista rilato, meritas esti ofte vizitata de poloj, sendepende de aliaj cirkonstancoj.

Apartan intereson, mi opinias, prezentas por la bulgara societo la vizitoj de la polaj ĝeinstruistoj, ĉar tiuj instruadagantoj post sia reveno en Polujon dividadas siajn impresojn kun siaj lernantoj kaj tiamaniere plantas en la kreskanta generacio intereson al Bulgarujo. En tio ni povis certigi jam dum 1933, kiam ni vizitis Polujon kaj tie sur la loko mem ni povis ekscii pri la propagando, kiun profite al Bulgarujo estis farintaj tiuj po-

laj ĝeinstruistoj, kiuj kelkajn monatojn antaŭe estis vizitintaj Bulgarujon.

Ankaŭ dum la pasinta somero Bulgarujo estis vizitita de granda nombro da poloj, kiuj pasigis sian tempon ĉefe en Varna. La plej granda grupo, kiu vizitis Bulgarujon, estis la grupo de polaj ĝeinstruistoj, gvidata de la Varŝava instruisto s-ro Jan Jascembski kaj kalkulanta ĉ. 70 personojn, kiu grupo estis gasta de la Bulgara instruista asocio. Post sia reveno en Polujon multaj el tiuj ekskursintoj per leteroj al siaj konatoj tie ĉi esprimis siajn sentojn de granda dankemo pro la montrita al ili gastamo kaj sian entuziasmon pro la belajoj de la bulgara naturo. Pli malsupre ni prezentas nur du el tiuj leteroj, kiuj, mi opinias, prezentas publikan intereson: unu el ili estas skribita en formo de alvoko. La aŭtorino de tiu le-

tero estas la popollerneja instruistino en Rava-Ruska, f-ino Mječislava Emilia Kendljarska.

Jen ŝia letero alvoko:

„Al la fratinoj bulgaroj!

Ni jam revenis en Polujon kaj de ĉi tie ni sendas al vi la plej belajn kaj plej korajn bondezirojn.

Tra tiu granda spaco, kiu nin disigas, mi etendas la manon je signo de kora danko por ĉio, kion vi faris por ni.

Ni venis ĉe vi, levante la standardon de amikeco kaj de unueco de la slavaj popoloj.

Kun vi ni travivis kelkajn semajnojn, kiuj ŝajnis al ni kiel mirinda kaj ĉarma fabelo. Vi donis al ni tre multe. Vi malvolvis antaŭ ni la belajn kaj la ĉarmon de via mirinde bela tero. Ni venis al vi kun koro, kaj vi ĝin prenis en viaj varmaj, bonaj manoj, ĉar bone estis al ni ĉe vi, ĉar vi estis por ni proksimaj, parencaj kaj tre karaj. Tio ĉi ne estas pola bulgara „proksimiĝo“, sed firmiĝo de la koraj ligiloj de la pola bulgara amikeco, tio ĉi estas kunverŝiĝo de la koro de la du popoloj.

La ligiloj de la pola-bulgaraj sentoj devas esti daŭraj, ĉar centiara historio estas liginta sanse tiujn fratajn popolojn.

Estu benita Bulgarujo! Mirinda, bela tero de la suno!

Ke la amikeco kaj la memoro pri ni estu por ĉiam en la koroj de la bulgaroj same tiel eterne kaj kore, kiel ankaŭ en niaj koroj.

Ni dankas vin pro ĉio kaj varme vin invitas en Polujon.

Venu!

Urbo Rava-Ruska l. VIII. 1934. Mječislava Emilia Kendljarska.

En aparta letero s-ino Kendljarska, atendigante nin pri la cirkonstanco, ke la skribaĵo en ŝia alvoko „al la fratinoj bulgaroj“ esprimas la sentojn de ĉiuj nartoparantaj ilian ekskurson, metas tiun alvokon fari publika. Ambaŭ tiujn leterojn ni ricevis jam en la komenco de aŭgusto n. i. sed pro sendependaj de ni kaŭzoj, ili ĝis nun restis nenresitaj.

Alia instruistino, f-ino Janina Hičkuvna, de urbo Pŝevorsk, skribas ie la 23. oktobro n. i. al unu ŝia konatino en Sofia, interalie la jeron:

„Mi rakontis al miaj lernantoj pri Bul-

garujo, kaj ili tuj esprimis la deziron komenci leteran ligon kun bulgaraj lernantoj, se vi kompreneble estos tiel bona kaj tradukos al ni pole la leterojn de viaj lernantoj. Miaj lernantoj jam nun treege ĝojas ekscii kion respodos al ili la bulgaroj...“

Jen la letero mem skribita de la lernantoj de VI fako, (II-a progimnazia klaso) de la sama lernejo:

Pŝevorsk, 22. X. 1934. Karaj bulgaraj lernantoj!

Dum la lasta somerferio nia instruistino de gepatra lingvo estis en Bulgarujo kaj rakontis al ni tre belajn aferojn pri via lando, pri via maro kaj pri viaj lernejoj, ni decidis fari kun vi perleterajn ligojn.

Ni envias al vi pro la belaj sunaj tagoj dum la somero, ĉar ĉe ni ni havis grandajn inundojn, kiuj pereigis nian landon kaj nun multaj homoj restis sen azilo. Dezirante helpi al la viktinoj ni nun kolektas helpon por helpi al ili. Sed nia lando estas granda kaj riĉa kaj nombras 32 milionojn da loĝantoj.

Ĉi-jare Polujo atingis grandajn sportajn sukcesojn. Unu el ili estis la konkurso pri ĉirkaŭflugo de Eŭropo per aeroplano. La vojo de tiu traflugo, ve! ne pasis tra Bulgarujo, sed vi certe aŭdis, ke Polujo gajnis tiun konkurson, samkiel tiun kun la balonaj flugoj. Vi nun certe ĝojas je bela vetero, kaj ĉe ni nun estas tiel malvarme, ke ni jam hejtas. Ni tre deziras vidi vian belan landon, kovritan de bonodoraj rozoj kaj vinberoj, kaj tiel same vian ŝaumantan Marica kaj vian koren — Sofia.

Ni tre ĝojos, se vi respondos al ni kaj tial senpacience ni atendas de vi novaĵojn kaj sendas al vi multajn korajn salutojn.

La lernatoj de la VI fako de la knaba lernejo, ulica „Szkolna“.

Ankaŭ ĉiuj aliaj leteroj, kiujn ni havas enmane, senditaj de poloj, vizitintaj foje Bulgarujon, donas al ni bazon rigardi kun plena (kon)fido al la estonta feliĉa disvolvo kaj firmiĝo de la pola-bulgara amikeco.

Esperantiĝis el ĵurnalo „MIR“, Sofia, 15. XI. 1934: Ivan H. Krestanov,

Ul. 6 Septemvri, 2, Sofia, Bulgarujo.

AL MIA PATRINO.

La pendolo de la horloĝo faras pacience sian tik-takon kaj per movo aperaŭ rimarkeble antaŭteniras la montriloj. Mi rigardas la horloĝon kaj mi pensas pri vi, mia Patrino.

Je tiu ĉi horo, precize antaŭ dek jaroj komenciĝis via agonio. Via koro, konsumita de l' nekuracebla malsano, ne povis plu barakti. La morto komencis kovri vin per la vualo de l' senkonscio,

antaŭ ol haltis la koro kaj la brusto ne levis sin plu en spiro.

Dek longaj jaroj! La penso kuras malantaŭen sur la vojo de l' tempo. Ĝi kuras al tiu malklara, nebula elirpunkto de la plej frua infana konscio, kaj ĉiam vidas vin, amantan, kareseman, patrinan. Mi vidas vin, kiel vi klinas vin super mia liteto, jen por karesi min, dezirante bonan nokton, jen por meti la manon sur mian varman frunton, antaŭ ol la termometro diros al vi, ĉu vere mi estas malsana. Mi vidas, kiel vi klinas vin super la hejmaj kalkuloj, aŭ kiel rapide via mano movas la turnilon de la kudromaŝino, por fari al mi novan, simplan veston el katuno. Kaj la fortranĉitaj restaĵoj — ho kia ĝojo! — servos ja por vesti mian pupon, tiun plej amatan, kiu fermas kaj malfermas la okulojn.

Kaj mi vidas, kiel poste, dum miaj lernejoj, ĉiutage matene vi leviĝas frue, pli frue ol mi, por plekti miajn harojn kaj friti por mi bongustan ovaĵon. Kaj kiel vi poste demandas, kiel pasis la lerneja tago, ĉu oni vokis min respondi, ĉu okazis la timinda klaslaboro dum la matematika leciono.

Kaj poste, kiam la sortobato vidviniĝis vin, mi vidas viajn maldolĉajn larmojn, mi vidas, kiel vi maliuniĝis subite, nekredible subite. Miaj infanaj okuloj ne povis ne vidi, kiel viaj pensoj kaj rememoroj flugis returnen, al la tagoj pasintaj, feliĉaj... Kaj mi memoras, kiel ĉiudimande la celo de viaj malŝataj promenoj estis la tombejo, kaj kiel vi revenadis de tiuj promenoj doloranta kaj rompita.

Kaj mi memoras kiel kelkfoje vi esprimis dezirojn pri mia esonteco — dezirojn, kiuj ne plenumiĝis, kaj pentris sur la tolo de esnero bildojn, sur kiujn la destino ne metis sian subskribon.

Kaj fine la malsano komencis hori vian korpon. perfida malsano, kiu malkovras sian malcan vizaĝon, kiam forkuro ne estas jam ebla. Kaj nailita al via suferlito vi atendis la morton, ĉar jes — vi konsciis en la fino, ke tio estas via lasta malsano.

La pendolo de la horloĝo faras pacience sian tik-takon kaj per movo apenaŭ rimarkebla antaŭeniras la montriloj. Je tiu ĉi horo, precize antaŭ dek jaroj, vi spiris la lastan spiron...

Vi foriris, vi forlasis ĉiun malgrasiĝintan korpon, kiun ni transdonis a la tero. Estu al vi la tero malpeza... Kaj estu feliĉa en la mondo, kie doloroj ne ekzistas plu. Tion deziras al vi en la horo l' rememoroj via filino. L. Z.

TADEUSZ BILIŃSKI

KIO ESTAS LA NUNTEMPA ROMANO ?

Romano — la plej multe legata libro de l' nuntempo. — Kion serĉas la leganto en la romano? — „Bildo de l' mondo“. — Alia enhavo kaj alia formo. — Du principaj temoj. — Romano psikologia kaj sociologia. — Romano kosmopolita. — Reverso de l' unueco de l' agado. — Reviviĝo de l' romano.

Statistikoj de publikaj libropruntejoj konfirmas konkorde, ke la plej multe legata libro estas nuntempe la romano, kio pruvus, ke tiu speco de verkado pleje respondas al bezonoj de l' legantaro.

Sed tiu bezono tute ne estas — kiel ĉi povus tro rapide konkludi — rezulto „de vakuo de l' koro kaj saĝo“ kaj rifuĝo al la senpene digestebla kaj facila legajo, kiu ne postulus laboron de l' penso kaj sento — ĉar — kiel ankaŭ la statistikoj montras — la plej multe serĉataj ne estas romanoj aventuraj, kriminalaj kaj vojaĝaj — sed verkoj de **Up-ton kaj Levis Sinclair, Galsworthy, Wells, T. Mann, Hemigway, Wassermann, Dreiser**, kaj ĉe ni de **M. Dąbrowska**.

Do inteligenta leganto serĉas en la romano ĉion, kio ne estas nur distro, kaj tio estas la tutbildo de l' vivo, „la bildo de l' mondo“, kiun ne donas al li sciencaj libroj, traktantaj nur kelkajn apartajn problemojn filozofiajn, aŭ sociajn.

La leganto postulas de la romano, ke ĝi apartajn akiraĵojn de l' homa penso kunigu organe je tutaj, donante „bildon de l' vivo“, ĉar li esperas, ke tiamaniere li retrovas apogpunkton por orientiĝo en komplika mondo de aperaĵoj de nuntempo.

Se la nuntempa romano volas kontentigi tiun ĝeneralan bezonon de l' legantaro, ĝi devas sin turni al alia enhavo kaj alia formo, ol faris tion la antaŭaj romanoj. Estas kompreneble, ke la fina „enhavo“ de l' romano estis kaj ĉiam devas esti la sento pri realeco de l' vivo. Tiu sento de l' vivo transiĝas al la nuntempa leganto nur tiam, kiam ĝi estas saturita de elementoj de la nuntempa pensado.

Kaj ĝi tute ne estas hazardo, ke hodiaŭ eĉ la plej interesaj aventuroj de individuo ne alforĝas la atenton de l' leganto. La nuntempa romano baraktas pri interesiĝo alimaniere. Jen ĝi malsupreniras al tiuj plej profundaj tavoloj de l' animo, kie ekestas kaj naskiĝas sen-

toj, klopodante trovi kaŭzan ligon inter agado de individuo kaj konsciigitaj — aŭ duone konsciigitaj — originaj ecoj de l' animo, kvazaŭ hereditaj el pratempoj (Joyce, T. Mann, Maugham, Lawrance). Aŭ ĝi ankaŭ provas alian vojon, prezentante individuon en kunligiteco kun homamaso kaj sur fono de l' epoko (Dreiser, Upton Sinclair, Galsworthy, Fallada, Dąbrowska, Ehrenberg k. a.).

En preskaŭ ĉiuj romanoj, kiuj estas karakterizaj por la aspekto de l' nuna epoko, transvelviĝas du principaj temoj. Unu — jen problemo resumiganta per la vortoj: „Kiel multe la homo sub influo aŭ devigo de siaj originaj fortoj estas perfortata agi spite al sia konscia volo“. Kaj plue: „Kiom multe unuopulo en konkordo kun sia individua volo, aŭ eĉ sen ĝi, estas subita al influoj de homamaso?“.

La postmilita romano estas psikologia kaj sociologia kaj utiligas egale naturhistoriajn akiraĵojn de K. Darwin (Wells) sociologiajn de K. Marx kaj Sorel, psikoanalizajn de Freud, filozofiajn de Bergson kaj ekzakte sciencajn de Einstein k. a.

Estas tute kompreneble, ke tia nuntempa romano, jam pro sia esenco, devas esti internacia kaj tuthomara.

De kiam ekonomiaj limoj ne koincidas precize kun tiuj lingvaj kaj de kiam ne iu difinita teritorio, sed la tuta planedo fariĝis patrujo de l' homo — tendenco eminente naciisma, „hejma“, tiom malpli „regiona“ ne povas esperi interesigon de l' internacia legantaro. Tio tute ne signifas, ke la nuntempaj romanverkistoj ne elektas volonte kiel teronon de sia romanagado sian propran patrujon, sed ili rigardas ĝin ne per okulo de loka etbienula patrioto, sed per okulo de „mondciivitano“. Ekz. tiel rigardas sian naskurbon Londonon — Galsworthy, la amerikano Okcidenton — Sinclair Levis, Berlinon — Döblin aŭ T. Mann — Lübeck'on, kaj fire Varŝavon — M. Dąbrowska.

La nuntempa romano postulas ankaŭ

alian romanteknikon kaj alian formon. La hodiaŭa leganto — dank' al filmo — komprenas ĉion pli rapide kaj orientiĝas pli lerte en ŝanĝiĝo de kapturte sinsekvantaj bildoj kaj situoj. El tio ankaŭ profitas „la nuntempa epopeo“, donante pli multe da vizioj, ol antaŭe. Do la nuntempa romano aŭdacas la senfinan multecon de l' mondo prezenti sinfrotne (samtempe). Tial en la hodiaŭaj romanoj estas ne nur du aŭ tri agadoj, sed ili estas rimarkinde pli multaj, kio fariĝas sen difekto al unueco de principa romana vizio. Kiel iam la Elizabeth-perioda dramo en Anglujo krevigi unuecon de loko kaj tempo — simile ankaŭ nun la nuntempa romano renversas la leĝon de agadunueco.

Alia formala rimedo, kiun devigis epreni la nuntempa romano, estas „objektiva maniero de prezento de vivo“. La hodiaŭa aŭtoro devas tion konsideri, ke liaj legantoj konas de filmo kaj radio sufiĉe precize „eksteran“ terkruston kaj tial, se li ne volas tro sentige difekti la iluzion, li devas impresigi ĉe l' leganto, ke li mem bone konas tiujn aferojn, pri kiuj li verkas.

Se la leganto havas dubojn ĉi-rilate kaj ne kredas la eksteran realon, de li konstruata, tiam li ankaŭ ne ekkredos lian internan mondon kaj — eĉ se la aŭtoro pleje certigadus pri sincereco kaj aŭtentikeco de siaj sentoj kaj travivaĵoj — malgraŭ tio oni ne kredos lin, se li ne prezentis „objektive“ tiujn aferojn, kiuj vekis en li tiujn sentojn.

La ĉiam-plifortiĝanta — de post la granda milito — barbereco kaŭzis terurecajn ekstermojn en ĉiuj fakoj de la kulturo. Ankaŭ sur la kampo de literaturo precipe teatro eksuferis tre multe, fariĝante sub premo de intelektaj analfabetoj, preskaŭ ekskluzive ejo por distriĝo.

Sole nur romano konserviĝis dum tiu ĝenerala kadukeco kaj travivas nun sian ĉiam pli grandiozan renesancon — kiel ununura formo de verkado, konvenanta al la nuntempo.

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO

ESPERANTO EN PORTUGALA RADIO. Radiostacio Parede — Linha de Cascais — ondlongo 24,2 (12.396 kc.) dissendas ĉiun duan kaj kvaran sabaton de la monato en Esperanto. Informojn donas Radio - Klubo CT. 1. 60. Parede. Linha de Cascais, Portugalujo.

GAZETARA SERVO. Ĝi estas tre grava ilo en nia propaganda laboro. Grandskalan gazetaran servon aranĝis nun svedaj samideanoj. Ĉiujn informojn donas sekretario S-ro E. Malmgren, Drotninggaten, Stockholmo. — Ankaŭ nederlandaj esperantistoj organizis simi-

lan servon. — Kaj nun ekstaras demando: Kio okazas kun Pollanda Gazetara Informservo? Siatempe Varŝavaj samideanoj komencis tiun laboron. Ĉu eble ankau jam finis?

La prezidanto de Esperantista Akademio s-ro Rollet de L' Isle dankas al la tuta pola samideanar, en kies nomo ni prezentis al li bondezirojn okaze de lia 75-jara naskiĝtaga jubileo.

S. A. T. KONGRESO. La plej proksima Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazos dum aŭgusto 1935 en Parizo.

PAROLADO PRI ESPERANTO SUR ITALA ŜIPO. La 17-an de januaro sur moderna, luksa, rapidega motorŝipo: „N E P T U N I A“ de la kampanio Consulich-Triesto (Italujo), revenante en ordinara vojaĝo el Suda Ameriko, nia samideano, prof. Agostino STELLACCI, kapelano de la sama ŝipo, parolis en la salono de la turisma klaso antaŭ ĉeestantaj multaj

gepasageroj, oficiroj kaj maristoj de la ĝiea „Dopolavoro“ (postlaboro) -rondo „PRI ESPERANTO, ĜIA AUTORO, ĜIA ESENCO KAJ TRAFI PROPAGANDILO DE ITALUJO EKSTERLANDEN“.

La grava, sprita parolado vekis grandan intereson pri nia lingvo kaj estis unua paŝo por enkonduki esperantan lernadon inter italaj maristoj de la fama markompanio. La parolanto ricevis multajn elkorajn gratulojn kaj varmajn aplaŭdojn kaj kvazaŭ certe gvidos kurson sur la ŝipo por la kunvojaĝantaj oficiroj kaj maristoj.

Peto al niaj legantoj: bv. la sciigon traduki nacilingven kaj, aperiginte en gazeto, sendi la ekzempleron al la aŭtoro de l' prelego: prof Stellacci Agostino. (Vicoletto Trinita, Spagnoli 3, NAPOLI, Italujo), — kiu tion bezonas por plua propagando.

POLLANDA KRONIKO

KRAKÓW. Societo Esperanto okazigis la 18-an de decembro p. j. akademion por solenhoni la 75-an datrevenon de l' naskiĝo de nia Maistro. La akademion malfermis nia prezidanto prof. Bujwid. Bele kaj tre interese parolis prof. de Jag. Univ. Dro Wilkosz. Deklamis bele f-ino E. Srebrna la poemon: „La donacoj de l' Majstro“ kaj la plej juna aktorino de la urba teatro Roma Manberówna deklamis impresplenan poemon de nia konata verkistino Irena Szczeŝańska. Sekvis bela, inteligenta pianludo de f-ino Streissenberg kaj fine la najtingala voĉo de kantistino Celina Nadi ĉarmis la aŭskultantaron. Akompanis subite profesorino Stein.

Dona la festo oni vendadis esp. librojn. Ĉeestis granda nombro da esperantistoj.

WILNO. Lasttempe unuiĝis la „Esp. grupo ĉe „Sul - Kult“ kun la „Esp. grupo ĉe „Z. T. K.“ kiuj alinomiĝis je „T. E. R. O.“ (Turista Esp. rondo). La noveformita estraro konsistas el: S-ro D-ro Gurviĉ - Prezidanto; S-ro D-ro Goldburt, S-ro Ŝik - Vicprezidanto; S-ro Liŝic - sekretario; S-ino Subotnik - Kasisto; S-ano Suster - Bibliotekisto; S-ro Gajfen, S-ro Menŝes - Komitatanoj. Estas ŝvidataj jenaj kursoj: Ĉe — metoda — S-ro Ŝik: Komencanta — S-ano Subotnik, meza — S-ano Suster; Sunera — S-ro D-ro Gurviĉ. Antaŭ nelonge organiziĝis klubo, kie funkcias konstanta

legejo de esperantaj gazetoj kaj revuoj, diversaj ludoj. Ankau oni prelegas pri diversaj temoj.

„Turista Esp. Rondo“ ĉe „Z. T. K.“ aranĝis la 15. XII. 1934 Vesperon dediĉitan al la 75-jara naskiĝtago de D-ro L. Zamenhof. S-ro D-ro Gurviĉ malfermis la vesperon. Post li parolis S-ro D-ro Goldburt pri la interna ideo. Blovorkestro (parte el S-anoj) ludis la „Esperon“, S-ro D-ro Gurviĉ malkovris la novan standardon kaj S-ano Subotnik samtempe deklamis la „Preĝon Sub Verda Standardo“. Poste sekvis salutoj. En la nomo de Vilna Esp. Rondo Akademia — S-ano London; en la nomo de la Vilna juda landkorema societo S-ano Menŝes. S-ano Ŝik laŭlegis ĉiujn ricevitaĵajn salutojn.

Preleĝis S-ro D-ro Gurviĉ s. t. „Zamenhof kiel poeto“. S-ano Mgr. Sindelman preleĝis pollingve pri la vivo de Zamenhof. Laste parolis iudlingve S-ano Ŝik pri la evoluo de Esp. Li ankau aŭdiĝis la diskon kun voĉo de l' Majstro. La orkestro finis la oficialan parton per „Tagiĝo“.

La duan parton de la Vespero t. e. la muzikan - voĉan plenumis: la orkestro, S-ano Subotnik, S-ro Ŝapiro kaj S-ano Portnoj.

Vendrede la 14. XII. estis inaŭgurata la Esp. Ekspozicio, aranĝita ankau de T. E. R. O. Por tiu celo estis kunvokata gazetara konferenco, kiu plene sukcesis. Kurvenis reprezentantoj de ĉiuj lokaj ga-

zetoj, kiujn S-ano Sik informis sufiĉe detale pri la stato de Esp. movado. Post kelkaj tagoj aperis en ĉiuj gazetoj favoraj artikoloj. Granda salono estis plennigita de diversaj Esperantaj. Multaj

sildetoj anoncis diversajn fakojn de la ekspozicio.

La ekspozicio estis vizitata de ĉirkaŭ 500 p.

R E C E N Z O J.

JELUŠIĈ: CEZARO. Tradukis Ivo Rotkviĉ. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝt, Mesier-u. 53. 536-paĝa. Formato 20 x 13,5 cm. Kun bela kovrilpaĝo. Prezo: broŝurita svfr. 9.—, bindita svfr. 11.— plus 10% por sendkostoj. La tria libro de la Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj por la jaro 1934.

EPOKFARA VERKO.

(Sur la margeno de „Cezaro“ de Jeluŝiĉ).

Ne pri la aŭtoro mi pensas, sed pri la tradukinto s-ano Rotkviĉ. Estas io tiom frapanta en la tradukaĵo, ke mi apena povas teni la plumen skribante, aŭ pli vere. skribonte pri ĝi.

Cu povas interesi la gelegantojn de „P. E.“ ke mi, persone, de tempo al tempo, ekhavas la ideeton pri kelkgrada spirmarko en la de mi kaj de vi ĉiuj tiom amegata lingvo Esperanto? Se jes, mi permesas al mi mem nun, post traleŝo de „Cezaro“, esprimi la opinion, ke miloble falsa estas la „ideeto“ pri nesufiĉeco de Esperanto! La traduko de Rotkviĉ tian pravas en tia grado, ke... ke mi mem sentas spirmankon, ne nia lingvo!

Estus necese — kaj verŝajne tio okazos iam — analizi frazon post frazo la lingvaĵon de Rotkviĉ, por ke nia skeptikema publiko (inkluzive la esperantista) lernu kaj ekkonu sciigu kaj akiru la konvinkon, ke Esperanto — estas — almenaŭ lingvo ne sufiĉe admirebla. Tiom da eb-lajoj ĝi enfermas, tiom da diversaj nuancoj vortfaradaj, kiom eĉ mi, kiu anĝis al mi ĝis nun la kapablon koni ĝin iom, supozetis neniel!

Mia admiro mia adoro — pardonu la entuziasmo, ho leganto! — estas neesprimbla, absolute neervortigebla. Mi konfesas kaj ne hontas konfesi, ke mi lernas nur nun, post pli ol 20 jaroj, la veran Esperanton kun ties enkaŝitaj trezoraroj, dank' al la tradukaĵo de Rotkviĉ.

Mi citos kelkajn ekzemplojn, kiujn vi jam avidas aŭdi, mi antaŭsentas. Vi rimarkos ke ne per eltrovado de novaj, fabrikaj vortoj, Rotkviĉ riĉigas la lingvon. Li faras tion per la malnova, aŭ almenaŭ preskaŭ malnova, ekzistanta materialo, nur tie kaj ie ĉerpante el la plej freŝa affluajo de la lastaj 2—5 ja-

roj. Jen legu: Ekzemple, sur p. 141 ofte ripetiganta en la libro kuraĝa uzo de „dis“: la ruza rideto en la vizaĝo de Krasso **dislarĝiĝas**. Aŭ sampaĝe: tiam **disflamos** ĉie. Sampaĝe: en Etrurio tuj troviĝas du legioj **armilprete**. Sampaĝe: **pugnoteni** iun kvietan.

P. 142: ne **okulmovi**; Krasso **saltleviĝas**; **manfrotante** la mentonon; konsternite li **okuleĝas** al Cezaro.

P. 143: **lipmordi**; pli klarparole, tio signifas....

P. 144: **enpremi** en la manojn de... la diktatoran bastonon.

P. 180: la demandato malplezurete **okullevas**.

P. 184: **disbuŝe** okulante al. Simile p. 185: **disporidi**. (**Disbuŝe** = rozdzia-wioną gęba, **disporidi**: roztworzyć drzwi naociecz).

Tre bona esprimo anst. „elteni“: Cicerono ne plu povas elpacienti sur sia loko (p. 179).

Interesa novaĵo: la kupolo de Kapitolulo **superturas** la urbegon (p. 185) ktp. ktp.

Sur p. 184 ni trovas: la kapo de Krasso denove **pendfalas** sur la bruston (opada). En aliaj lokoj mi trovis **falpendi** = zwi-sać.

Estas treege penige kun krajono en la mano noti ĉiujn interesajn novaĵojn de la traduko. Por citi ĉion citandan necesus plenpresigi tutan numeron de „P. E.“!

Anstataŭ voĉtreme (p. 141) mi preferas: **tremvoĉe**. samkiel **molvoĉe anst. voĉmole** (p. 143) kaj **lamvoĉe anst. voĉ-lame** (p. 142), kvankam mi konfesas, ke estas nuancediferenco inter ambaŭ. Voĉlame“ de Rotkviĉ signifas preskaŭ tiom kion: **halbute**.

La esprimo: Krasso sidas sur pingloj (p. 140) estas kompletigenda per la vorteto „kvazaŭ“, mi dubas ĉu orientanoj aŭ aliaj lingvanoj tuj komprenos la esprimon: **siedzieć na szpilkach**.

Se mi diros, pretere, ke ĉi novaj vortoj, uzitaj en la traduko, ne tro abundas, mi estas rajtigita nomi la verkon: epokfara.

Selma Lagerlöf: Gösta Berling. Trad. Stellan Ensholm. Ilustrita de Einar Newman. 552 + 16 paĝ. Prezo broŝ. sved. kr. 6.—, bind. 7:50 Eld. Soc. Esperan-

to, Stokholm.

La granda sveda poetino kaj verkistino Selma Lagerlöf, nobel-premiitino, jam estas konata al la tutmonda esperantopubliko per kelkaj el siaj pli malgrandaj verkoj, eldonitaj de la sama eldonejo. Nun prezentiĝas ŝia unua ĉefverko, per kiu ŝi gajnis sian mondfamon.

En Gösta Berling la aŭtorino majstre pentras ne nur la vivon de la bela sveda provinco Vermlando kaj la tieajn bravajn, harditajn homojn, sed ŝi montras, kiel en ĉiu homo, eĉ la plej simpla, malriĉa kaj mizera, estas troveblaj bono kaj eĉ horoeco, oferemo kaj amo. La heroo de la libro estas geniulo, bonkora sed malforta kaj ŝanĝema laŭ karaktero. En sia verko Selma Lagerlöf ne nur analizas la profundojn de la homaj animoj, sed ŝi montras per klaraj kaj vivoplenaj bildoj la brilan vivon sur la Vermlandaj bienoj kaj ankaŭ la dolĉan, iom mistikigan naturon de Vermlando, kie vivis multego da legendoj.

La tradukon lerte faris la konata verkisto Stellan Engholm. La tre persona kaj poeziplena stilo de la aŭtorino donis al la tradukinto sufiĉe malfacilan taskon, sed li bone scis konservi la vivon kaj la ĉarmon de la verko.

La eldonejo havis la bonŝancon, igi unu el la plej famaj artistoj de Svedujo, Einar Nerman, ilustru la verkon per belegaj tutpaĝaj bildoj. La broŝurita eldono havas kvarkoloran kovrilon laŭ desegnado de la sama artisto, kaj la bele kaj forlike bindita eldono havas oran silueton de la heroo, Gösta Berling.

Gösta Berling estas la plej multe legita verko de sveda verkisto. En sveda lingvo venis 34 eldonoj kaj la verko estas tradukita en 37 lingvojn. Ĝi estas ŝlosilo de multaj el la postaj verkoj de Selma Lagerlöf, kaj la pseŭdonimaj nomoj de personoj kaj lokoj en Vermlando forte enradikiĝis.

Josef Zauner: L' EUROPANISMO. 32 paĝoj. Eldonis USE-EHO, Timisoara (Rumanujo). Prezo 0.30 sv. fr. aŭ 1 respond-kupono.

S-ro Josefo Zauner, redaktoro de dumonata Use-Eho, eldonis broŝureton, prezentantan la celon de l' eŭropanismo, kiun la aŭtoro propagandas. Laŭdinde estas, ke tiu eŭropanismo havas nenion komunan kun tiu de Coudenhove Kalerĝi, kiu nun — ni povas tion trankvile diri — perfidis mem siajn ideojn.

L' eŭropanismo de s-ro Zauner staras, laŭ liaj vortoj, en la mezo, inter la faŝismo kaj komunismo, kvazaŭ kiel ilia rezultanto. Ĝi ekiĝas en la Danubo -

landoj, kiuj estos verŝajne la kern - ŝtatoj de l' venontaj Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo, kun komuna valuto, armeo, dogan- kaj eksterpolitiko, kaj kun komuna lingvo - eŭropa (eŭropana).

Tiu ĉi estas — Esperanto. La aŭtoro citas la kaŭzojn, kial li evitas la nomon „Esperanto“. Kelkaj el ili estas sufiĉe trafaj. Sed kial ne „Monda“ lingvo, sed nur „eŭropa“? Al tiu afero mi ankoraŭ revenos.

S-ro Zauner estas ŝovinisto, eŭropana ŝovinisto. Lia eŭropanismo estas „kontinent - nacia movado“, direktita, se ne tute kontraŭ Ameriko, certe kontraŭ Japanujo. Ĉu celo de Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo devas esti milito kontraŭ Japanujo?

Kun multaj ideoj de la aŭtoro mi ne povas konsenti. Kial ekzemple oni ne povas enkonduki unuecan eŭropan valuton sen politika unuigo? En historio ni havis jam similajn ekzemplojn (Unio de Gra Franko). — Ĉu vere la problemo de Danubo-ŝtatoj estas unuavice lingva problemo?

Realiĝi la Eŭropo-union volas s-ro Zauner ne per la nuntempaj aktivaj politikistoj. „katenitaj al diversaj landaj partioj“, sed per apogo je la homamasoj.

Eugen Elin.

Jerzy Droga, provizor farmacji: Kadziłto, Polujo: **WIECZNY KALENDARZ**. I część: Historja kalendarza. II część: Wieczny kalendarz. — Nia samideano, s-ro Droga jam de longa tempo interesiĝas pri la problemo de kalendarreformo. Antaŭ du jaroj ni aperigis koncizan resumon de lia ampleksa ellaborajo en P. E. Nun s-ro Droga aperigis 20-paĝan broŝureton pri tiu tempo en la pola lingvo. Ĝi ankaŭ aperis en la franca traduko. La enhavo certigas nin pri sperteco de la aŭtoro en tiu fako, akirita sendube per longjara studado. Ni deziras sincere al li, ke unu el liaj valoraj projektoj estu akceptita de Ligo de Nacioj por simpligi la nunan komplikan kalkulsistemon de la tempo.

„La Lyon'a Foiro jus eldonis novan afiŝon. Nia gazeto ricevis ekzemplaron de la nova esperantlingva afiŝo de la Lyon'a Foiro. Ĝi estas trikolora kaj mezuras 60 cm x 1 m. Post kelkaj tagoj la Lyon'a Foiro eldonos ankaŭ novajn tripaĝajn artajn prospektojn en esperanto. Por senpage ricevi la afiŝon kaj la prospekton, oni skribu al: Foire de Lyon, Esperanto Fakoj, Rue Ménéstrier, Lyon, Francujo“.

En „The International Prohibition Bulletin“ n-ro 43/34. japa lingva gazeto, aperis Esp.-artikolo s. t. „La triumfo de l' alkoholo“, verkita de prof. Sygnarski el Bydgoszcz, kaj presita siatempe en P. E. La gazeto enhavas ankaŭ japanan tradukon de l' artikolo. El pluminoto de sendinto de l' gazeto ni ekscias, ke la sekvanta kontraŭalkohola kongreso okazos en Varŝavo (1936). Krome ni povis traŭsi en la gazeto Esp.-signaldiron: „Unuiĝu por abstinenco de la mondo“.

„La progreso“, ĉeĥoslovaka Esp.-revuo, n-ro 7, redaktata de s-roj Dro Kamaryt, Ginz kaj Hromada, evidente baraktas kontraŭ eldonmalfacilaĵoj, kio nin cetere tre mirigas, ĉar CSR. estas konsiderata kiel lando kun forta Esp.-movado. Tion multjare pruvadis al ni la jarlibroj de UEA. Atendinda estas en tiu n-ro kompletigita reĝistro de „Zamenhof — kaj Esperantost-atoj kaj placoj“. Sed kial mankas tie la jugoslava Esp.-insulo? — Okulfrappe estas, ke la redakcio evitas la sufikson „-ujo“ por nomi landon.

Certe „La praktiko, la gazeto, kiu instruas kaj amuzas“, eldonata de Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Rieuwstraat 172, den Haag, Nederlando, apartenas al la plej interesaj revuoj en Esperantujo. Multegaj konkursoj, en ĝi publikigataj celas instiigi novajn samideanojn al pli funda studado de l' lingvo. Riĉe ilustrata, tre lerte redaktata la gazeto povas esti tre interesa legajo eĉ por spertaj samideanoj. El la gazeto ni ekscias, ke ekzistas parolanta filmelo pri la Esp.-kurso de Andreo Cseh. Eble ĝi estus aplikebla ankaŭ en nia lando?

Sub papera rubando, kiu surhavas presitajn vortojn: Tokyodo, Ltd., Kudaushita Kejimachi, Tokyo, Japan, Magazine kaj stampon: Tokio-Do, E. F. Kudan, Koojimaĉi, Tokio, Japanujo — ni ricevas ian tre elegantan japanan revuon, el kiu ni tamen nenion komprenas kaj nenion povas diri. La tuta enhavo estas por ni ia mistera sekreto. El la maro da strangaj por ni signoj ni povas nenion diveni. Bonvolu doni al ni ian klarigon.

RIPROĈETOJ KAJ KONTRAŬRIPROCO.

Responde al la „riproĉetoj“ en la n-ro 1 de nia „Pola Esperantisto“ flanke de s-ro L. Dreher, kiu'n li faras, recenzante mian tradukon, kaj ne volante lasi al la legantoj la impreson, ke ili estas ĝustaj, mi permesas al mi reĝustigi ilin.

Petrolo, nafto estas ambaŭ oficialaj. Mi

Ni petas. La aldonita suplemento s. t. „Bona libro estas bona amiko“ ŝajnas esti japana bibliografio de la Esp.-gazetaro.

„Svenska Arbetar Esperantisten“ (Sveda laborista Esperantisto) el XI/34 enhavas interesan daŭrigon de „Tralingvaj prmenadoj“, (etimologio de kelkaj Esp.-vortoj) kaj valoran artikolon: „Kiamaniere oni perfektigu en la lingvo?“.

„Hinda Esperantisto“ estas simpatia revueto, eldonata de nia fervora samideano, s-ro Liem Tjong Hie (Semarang, Java insulo). El la 23-a n-ro ni ekscias, ke en Hindonesio estas uzataj pli ol 15 diversaj lingvoj, kaj ke en la tuta mondo neniu lando havas pli multajn specojn de bestoj kaj kreskaĵoj ol la insulo Sumatro.

„Etjuden“, revuo dediĉita al problemoj de kulturo kaj vivo, redaktata en jida lingvo en Wilno, entenas en sia n-ro 2 fakon turisman kaj Esp-an, en ĝi artikolon de s-ro S. Szyk s. t. „Provoj kaj projektoj de internacia lingvo antaŭ Esp.“, ankaŭ mallongan kronikon de la Esp.-movado.

„Esperanto lingvo internacia“ redaktata en Japanujo (Koku Saigo - Kenkijuso, Daita II-784, Setagaja, Tokio) estas ne presita sed „ĉelgrafita“ gazeto. N-ro 5—6 enhavas ampleksan bibliografion kaj prikongresan raporton — nur en japana lingvo krom titoloj kaj nomoj.

„Hispana Esp. Gazeto“ en XI/34 enpresis Esp.-radio-programon de polaj stacioj. Koran dankon! En la gazeto aperadas „Provo pri idearo“, kiu estas speco de enciklopedio. Krome enestas kelkaj raportoj, unu rakonto, poemo el la hisp. lingvo, esp-igita de la konata samideano s-ro Julio Mangada Rosenörn, kroniko, bibliografio kaj distraĵoj. Tre valora revuo de hispanaj samideanoj.

La juna vivo estas dusemajna organo por la junularo. La redakcio troviĝas en West Grafdijk (N. H.) Nederlando. Jarabono f. 1.00. Eldonkvanto 5,000 ekzempleroj. Specimena numero sennage.

Renovasion. Meksika ĵurnalo enhavas esperantan sektion.

pensas, ke estas necese ilin klardifini por ne intermiksi ilin. Tion mi faris en longa studo, publikigita en „Nia Gazeto“ (majo 1934), en kiu mi difinis petrolon kaj ĝiajn ĉefajn „frakciojn“. Petrolo, laŭ mi, estas la kruda likvaĵo, kiu formas la riĉecon ekz. de la borslava tero kaj

en la petrolo oni per frakciiga destilado ricevas multajn produktojn inter ili naiton (lamppetrolon).

— **povo.** Kial anstataŭ ĝi mi estus devinta uzi „aŭtoritato, registaro aŭ reĝimo“?! Unue povo estas bona vorto. Kabe diras ekz.: havi povon super iu, kaj Zamenhof parolas pri Ĉiopova Krome s-ro Dreher, kiel juristo, devus scii, ke oni povas havi povon sen aŭtoritato, kaj aŭtoritaton sen povo (ekz. Zamenhof!), ke ekzistas registaroj sen povo kaj povoj, kiuj diktas al registaroj. — Kaj fine ekzistas reĝimoj, kiuj havas nenion komunan kun diversaj kaŝaj povoj de la respektivaj laudoj. Estas ironio de l' sorto, ke ĝuste juristo ne komprenas la diferencan sencan de ĉiuj ĉi vortoj!

— **vitrino** estas en „Plena Vortaro“.

— **perfid** havas ankaŭ la signifon de malkaŝi; konatigi ion, kio devis resti sekreta: se en kor' io sidas, (vizaĝo*) perfidas diras Zamenhof. En „la pejzaĝo perfidas sekreto“ la verbo „perfidas“ estas certe pli poezia ol la proza „malkaŝas“. **prikalkulitaj** — Strange, ke la perfortanto en la uzo de radikokombino kun per, pri, el subite ĝin malkaŝas ĉe mi! Ĉu ne ekzistas ja multaj el pola lingvo similspaciaj laŭvorte tradukitaj esprimoj ĉe Zamenhof? Jen kelkaj: prilabori, elaceti, priskribi, prirabi, pristeli, eluzi, ellabori, ellerni ktp.

— **etaĝero** estas en „Plena Vortaro“.

— **enua.** Jes enua estas bona kaj ĝusta Zamenhofa uzo. Jen liaj ekzemploj: **malfacila kaj enua laborado; scienco havas semon enuan.** sed frukton bonguan.

— **sakramenta** estas oficiala vorto.

— certe. Vi pretendas, ke devas esti **versajne!** Sed mi informas vin, ke ili ne „versajne“ notis en sia libreto, sed „certe, nedubbele“. Pardonu, sed la devo en elekto aŭ decido de senco apartenas al aŭtoro kaj ne al kritikisto.

— **bokalo** troviĝas en „Plena Vortaro“. — **depostulo.** Neniu alia ol Zamenhof uzis en la senco de **rewidyknacia** la vorton **depostulo** (Vd. Grosjean-Maupin, Dictionnaire Complet français-espéranto), pardonu do, se pro tio mi opinias, ke **depostulo** ĉiloke estas pli bona, ol via „repostulo“!

— **transportigo** estis ĝuste uzita. Ties ne pri transporto, sed pri meto, igo en transporton. Oni ne nur transportas, oni ankaŭ transportigas.

— **certa** S-ro Dreher dekretas: devas esti „iu“, sed la aŭtoro ŝajne scias pli bone, kion li volas. Kaj la aŭtoro volas pewny kaj ne laudrehere: niejaki.

La esprimo „**tio estas la inversa flanko de la medal**“ ekzistas ne nur en pola, sed ankaŭ en franca, germana, angla, ĉeĥa, espereble ankaŭ aliaj lingvoj.

Nur al „**riproĉeto**“ pri ĉu — ĉu mi ne respondas, ĉar mi estas preparanta publikigotan studon pri tiu demando ĝenerale.

Tiel aspektas la „riproĉetoj“ de s-ro Dreher. Li faras rimarkon, ke „laŭ ĉiaj ŝajnoj la tradukado estis farata iom rapidece“. Ŝajnas al mi tamen, ke estas s-ro Dreher, kiu laŭ ĉiaj ŝajnoj kaj pro speciala simpatio, faris serzoroe sian recenzon. Tiam, kiam meritis nek la libro, nek la tradukinto. S. Grenkamp.

„). kelkafoje eĉ kritikoj!...“

KION RESPONDAS LA RECENZINTO?

Kiam la ĉi supra artikolo estis presita, mi petis la redaktanton, ke li montru al mi la manuskripton de s-ano Grenkamp, por samtempe respondi. Min ekregis emocieto, kiam mi vidis ĝin: la samaj, grandformaj, klaraj literoj, kiujn tiom ofte mi ricevadis antaŭ la milito en formo de leteroj al amiko. Ni ja estis grandaj amikoj - iam. Poste ja opiniferenco disigis nin. Cetero Grenkamp forflugis malproksimen, parizaniĝis, franciĝis...

Nun li opinias, ke mi ankoraŭ ne forgesis tiun afereton nin disigintan. Vi eraras. Grenkamp! Neniam mi estis tiom ege malproksima de ĉia persona malemo, kiom nun, kiam vi eldonas „Nian Gazeton“, tre verve, lerte kaj sperte redaktatan de vi kun Avril.

Se mi ne ŝatus vian por-esperantan

agadon, se mi ne ŝatus la memoron pri mia iama brak' - ĉe - braka kunbatalanto, unuvorte: se mi „gardus“ ankoraŭ ian malamikecon aŭ almenaŭ „kontraŭitecon“ rilate al via persono, mi neniam estus skribinta recenzon pri via traduko. Ja ĉiu recenzo, eĉ mallaŭda (tia nepre ne estis la mia) faras nur servon kaj reklamon al koncernato.

Mi skribis recenzon tial, ke Grenkamp ne estas novulo en Esperanto. Li apartenas al tiu malgranda, sed elita rondo familia restinta ankoraŭ el la tempo antaŭmilita. El la tempo, kiam ni, junaj knaboj gimnaziaj, konsideris Esperanton la plej arde, la plej fajre ŝatata kaj amegata ideo, la linĝvon la plej inda je vere profunda, senfine kaj ĝisfine, studado kaj studebado. Tiam, en tiuj bonaj, tempoj antaŭmilitaj, ni ne ŝparis tempon

kaj monon, nek lacis nek sentis enuon, senĉese plugi la esperantan kampon kun ĉiuj ĝiaj kaŝitaj trezoroj teoriaj kaj lingvaj - praktikaj. Ni ne disiĝis eĉ dum la milito mem, sed daŭre interŝanĝadis niajn longegajn leterojn, kiuj celis anstataŭigi la dolore sentitan mankon de „Esperanto“ kaj „Juna Esperantisto“, de „Ondo“ kaj „Lingvo Internacia“. Grenkamp eĉ abonis al s e p esperantaj gazetoj, kelkajn mi prunricevadis de li krom valoraj esp. libroj...

Nu, tial do mi sentas mia devo recenzi kaj kritiki liajn esperantajojn. Sen kolero kaj pasio, kompreneble.

Kaj lamem ne estas ekz. lute ĝusta, esti io perfekta, senmka, absolute senrara — laŭ lingva vidpunkto.

Kaj tamem ne estas ekz. lute ĝusta, kontraŭe, eĉ inversa, laŭ Grabowski kaj laŭ Plena Vortaro, estas la difino de G. pri nafto kaj petrolo. Ja laŭ P. V., kiun ĉiuj povas trarigardeti, petrolo estas ekstrakto de nafto, ne inverse, kaj tiun faktoron ne povas ŝanĝi eĉ dek artikoloj de gazeto.

Enua estas, malgraŭ ĉio, nur neŭtra, enuiga estas nudny, nudzący. Enua laŭ P. V. estas „de enuo“.

Sakramento estas pure-nure religia esprimo.

Bokalon mi ne konis, same vitrinon. Ambaŭ estas neoficialaj.

Depostulo malgraŭ Zamenhof povas montri nur postulon de io, kio ne apartenas al ni, „rewindykacja“ esprimas re-postulon de io, kio estas nia propraĵo de ĉiam. Laŭ Grab. depostuli estas wymóc.

Ĉu — ĉu estas klarigita de Zamenhof en Lingvaj Respondoj en la senco, kiun mi citis. Eble estas prava Grenkamp, se li volas ŝanĝi tion, sed... intertempe t. e. antaŭ ol la tuta mondo esperantista rekonis la ŝanĝon, estu permesate al recenzanto kritiki nerekonitaĵojn.

Mi faris mian recenzon vere rapidece. Mi provos rebonigi tion.

P. 13: ŝildo devus eble teksti (laŭ Grab.) elpendaĵo?

P. 14: kun la banado estas malbone, eble pli ĝusta estas: pri?

P. 20: ĵeti rigardon sur la ŝtrumpetoj, anst. -in.

P. 25: linio 14: „la“ eble superflua. Sampaĝe: favore anst. sukcese.

P. 28: klarigi ion pro, anst. ke, per.

P. 30: postuli por ke, anst. ke. Sampaĝe: rezulto pro, anst. el, aŭ de.

P. 32: preni iun kiel, anst. konsideri, opinii.

P. 33: nerdi la fidon en la sinceron, anst. je. Cetere mi preferas: sincereco.

Kaj sur p. 43 ni trovas: ĉu vi kredas en la destino? Mi preferus: je la destino. Mi estas scivola, kiel Grenkamp klarigos „kredi (fidi) en io (n)“.

Revenante al „povo“, mi proponas por wladza, Behörde **estraro**. En abstrakta signifo: **estrado**. La vorto „povo“ ŝajnas al mi tro malsufiĉa. Ĝin mi uzas, parolante ekz. pri la povo de luanto, kiu povas (havas la povon) subluigi sian loĝejon aŭ alpreni en sian loĝejon siajn familianojn.

Dr. L. D.

El la blindula mondo.

Redakcio de „**ESPERANTO DLA WSZYSTKICH**“, Warszawa, Nowolipki 36, parte subtenita de l' asocio: Związek Ociemniałych Żołnierzy R. P. eldonas ĝian februaran numeron sub la devizo: **ESPERANTO EN LA SERVO DE BLINDULOJ**. Multaj artikoloj de: Lidja Zamenhof, Leo Belmont, deputito majoro E. Wagner, red. H. Thilander, inĝ. E. Rytenberg, pianisto Imre Ungar, kpt. J. Silhan k. a. apud multnombraj interesaj ilustraĵoj jetas lumon al tiu ĉi grava sociala movado tutmonda, kiu depost tri lastaj jaroj faras mirindajn progresojn. Tutmonda federacio: „**UABO**“ ampleksas nun 9 gravegajn tutlandajn blindulorganizajojn kaj 13 viglajn asociojn de blindaj esperantistoj, entute 22 organizajojn el 17 diversaj ŝtatoj. La menciita eldono atestas elokvente pri la grava kunlaborado inter la blindaj samideanoj kaj iliaj vidantaj ĝeamikoj. Ni laboru por la baldaŭa komuna venko de niaj komunaj idealoj!!

Jan Silhan.

IOMETE DA HUMORO.

T'ERURE.

'Ĥio ĉi estas terura!

Mia edzino postulas monon matene, tage kaj vespere!

— Kion do ŝi faras kun tia amaso da mono?

— Mi ne scias. Mi neniom donas!

TROVO.

Sinjoro! demandas gasto la kelneron.

— Kion ĝi signifas? Mi trovis en la saŭco pantalononon!

— Ho, mi dankas afable!

Mi jam serĉis ĝin la tufan tagon.

MIRAKLO.

Ĉu via edzo estas hejme?

Mi havas ĉi tie kalkulon...

— Ho, ne! Mia edzo forveluris hieraŭ!

...Kalkulon, kiun mi volis pagi.

— Atendu, mi petas, tuj mi alvokos mian edzon.

Tradukis Esbe.

ESPERANTA EKSPOZICIO

ĉe „*Lerneja Muzeo*” en Bydgoszcz

Antaŭ kelkaj monatoj estis fondata en nia urbo „*Lerneja Muzeo*”, kie oni kolektas diversajn objektojn rilate al lerneja vivo de gejunularo. Ĉar en Bydgoszcz la geinstruistaro estas sufiĉe favora al Esperanto, tial la fondintoj decidis aranĝi samtempe esperantan ekspozicion, tiom pli, ke multaj el gejunularo korespondas esperante kun eksterlandaj samaĝuloj kaj interŝanĝas kun ili tre valorajn objektojn. Ĉi-tieaj lernantoj pruntedonis por kelka tempo plej belajn kolektaĵojn, sed estus dezirinde, ke la propagandiloj povu resti en la Muzeo por ĉiam.

Pro tio la subskribinto, kiu estas gvidanto de la esperanta fako, sin turnas al ĉiuj eldonejoj, redakcioj, lernejoj, esperantanj grupoj kaj privataj personoj kun afabla peto, ke ili bonvolu oferi kaj sendi al ni kiujn ajn esperantajn objektojn (librojn, gazetojn, gvidfoliojn, afiŝojn kaj ĉion, kio nur taŭgas por ĉi tiu celo). La nomoj de la donacintoj estos publikigitaj en loka pola gazeto „*Dziennik Bydgoski*”, kiu aperigas regule ĉiusemajnan „esperantan anguleton” pri esperanta movado en kaj eksterlande. La esperanta ekspozicio povos ludi tre gravan rolon en la propagando de nia kara lingvo. Pro tio ni esperas, ke tutmondaj samideanoj helpos nin en ĉi tiu entrepreno. La novfondita institucio ne havas, bedaŭrinde, monon por rekompenci ĉiun oferemulon per samvalora donaco, tamen ĝi estas preta sendi al ĉiu bildkarton kiel kvitancon je ricevita objekto.

Prof. *Syŝnarski Mieczysław*
Bydgoszcz, Kordeckiego 23
Polujo.

GRAVA SCIIGO POR KURSGVIDANTOJ!

Bonege konservitan, kompletan, antiktvaran kursmaterialon laŭ Ĉe-metodo, bezonatan por kursgvidantoj havigu ĉe „*Pola Esperanisto*”, Kraków, Lubicz 34. Prezo zł. 18.— kun afranko.

ĈU VI JAM FINPAGIS LA ABONON POR J. 1934?!

SE NE

PAGU TUJ JE NIA KONTO

P. K. O. 406.660.

RENOVIGU LA ABONON

POR JARO 1935!

Abonujcie miesięcznik „*Ondo de Daŭgava*” i „*Informoj de Estonio*” w cenie zł. 2.20 rocznie. Abonament przyjmuje admin. „*Pola Esperantisto*”. Konto P. K. O. 406.660.

RADIO.

Bonvolu nepre aŭskulti la disaŭdigojn en februaro, ĉar dum ili oni konatigos programon por pluaj monatoj, dume ne posedatan. Post la prelegoj nepre skribu al: **Polskie Radio, Warszawa.**

12. II. mardo 22h45—23h. Tad. Hoda-kowski: Interparoloj kun aŭskultantoj en Esperanto.

26. II. mardo 22h45—23h. Dro Adam Gadomski: Polaj vojaĝistoj kaj malkovrintoj.

La 6. II. ĉiuj ĉeĥoslovakaj radiostacioj disaŭdigos novan „*Esperantan horetton*”. Komenco je la 22h15m. Aŭskultu ĝin.

AL ĈIUJ KUNLABORANTOJ!

Skribu klare sur unu flanko de l' papero, kun larĝaj margenoj. Sendu nur koncizajn raportojn!

Afable ni atentigas niajn kunlaborantojn, kaj petas pri sendado de materialo aperonta en ĉiu plej proksima n-ro de P. E. plej malfrue la 20-an de la antaŭa monato.

Marta n-ro de P. E. estos speciale dediĉita al nia fama s-ano **LEO BELMONT** okaze de lia 50-jara literatura aĝado.

En la januara n-ro de P. E. ni publikigis alvokon kaj recenzon pri la teatraĵo „*Robinson*”. Bv. kiel eble plej multe disvastigi la aferon, kiu posedas gravegan signifon por nia propagando.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicę: 6 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 6.70, podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: male ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 34. KONTO P. K. O. NR. 406.000

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 av. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—